# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : **9** F. C. C. P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1977 — N° 63


## SUKCESA FEDERACIA KONGRESO EN NIMES

*la 8an de Majo 77*

Kontentiga estas la rezulto de la eksperimento kongresi dum du tagoj. Ni nun scias, ke se estonte aliel devos esti disdividita la programo, almenaŭ la principo de dutaga kongreso estas bona. Ni ekzemple notis, ke pro diversaj konsideroj, kelkaj ĉeestantoj ŝanĝis sabaton posttagmeze ( unua laborkunsido ) , sabaton vespere ( distra kaj kultura parto) kaj dimanĉon matene ( dua laborkunsido ). Malgraŭ tiuj " permutoj " ĉiufoje ni estis ĉirkaŭ 40.

Sro LLECH - WALTER bonvenigis la ĉeestantojn kaj Sro BERNARD reprezentanto de la deputito - urbestro alportis la oficialan saluton kaj aparte interesiĝis pri la projekto de leĝopropono celanta agnoski Esperanton kiel nedevigan lerntemon.

S - ino VOLPILIERE legis la senkulpigan peton kaj la bondezirojn de invititaj oficialuloj, kiuj ne povis ĉeesti. Ankaŭ ŝi legis bondeziran karton de la SAT - grupo de Babelsberg ( G.D.R. ) transdonitan pere de Sro RAYNAUD.

Vigla kaj interesa estis la diskuto pri la problemo de la esperantista gazetaro kaj la kreskigo de la membraro de U.F.E.. La kvina paragrafo de la oficiala protokolo sendita al UFE por la nacia kongreso - trovebla post tiu ĉi raporto - substrekas la alprenitajn decidojn. Cetere en la plena oficiala protokolo troviĝas ĉiuj alprenitaj decidoj kaj la rezulto de diversaj voĉdonoj ( Sro REGNIER el Quillan estis forgesita sur la listo de la aktivaj membroj de UFE aperinta en la lasta SFS. Pardonpeton ).

Sro DELIGNE esprimis la deziron ne plu esti federacia kasisto kaj S - ino NEGRON lin anstataŭos. Gratulojn kaj dankojn al Sro DELIGNE pro ĉio kion li faris dum 8 jaroj kaj bondezirojn al S- ino NEGRON pro la transpreno de la posteno.

D - ino VIERNE planis la vojaĝon de du esperantistoj hungarinoj tra la grupoj de nia federacio antaŭ kaj post la nacia kongreso en Grenoblo.

Post diskuto pri diversaj demandoj : instruo de Esperanto post la akcepto de la leĝopropono ( Sro LAVAL ), eŭropisma movado ( S - ino VOLPELIERE ), " Sudfrancia Stelo " ( Sro FRUS ), estis decidite, ke nia aŭtuna laborkunsido okazos en Sète, plej verŝajne en oktobro.

Tre interesa kaj ĉefa aldono al nia federacia kongreso estis la distra vespero. Senrĝproĉaj komentarioj de F- ino TERRAL substrekis belajn lumbildojn, kiuj rememoris aŭ konigis al ni la ĉarmojn de kongrestagoj en Vieno kaj kuopio kaj de la vivo en Grezijono.

Dro SALAN legis sian tradukon de juda legendo kaj S - ino AUTHIER kaj F - ino TERRAL majstre ludis la skeĉon de Bukar : " Incendio ".

La turismuma parto estis vizito tra la eksterordinare riĉa urbo je romiaj monumentoj, kiu okasis dimanĉon post la komuna tagmanĝo dum lernantino de Sro DELIGNE trapasis la unuagradan ekzamenon.

Plezure ni notis la ĉeeston de ges - roj BLARY el la najbara provenca federacio.

Gratulojn kaj dankojn al niaj nimaj gesamideanoj, kies rondo pligrandiĝis pro esperantistiĝo de tre simpatiaj geanoj jam tre kapablaj paroli la internacian lingvon.

JEAN AMOUROUX

---

# RESOLUCIOJ

Jen la alprenitaj decidoj dum nia federacia kongreso en Nîmes ( 7/8 - 5 - 1977)

1°/. - S - ino Lucette NEGRON, 22 Chemin du Mas Blanc - 34400 LUNEL estas elektita federacia kasistino anstataŭe de S - ro DELIGNE.

2°/. - La federacia kaso donacos 200,00 Frs por la " fonduso materialo " de U.F.E.
Ni petas ke kiam aperas listo de donacintj por la " fonduso materialo " en " Franca Esperantisto ", ĉiufoje estu klare indikata ne nur la ĝis tiam kolektita sumo sed ankaŭ la mankanta sumo.

3°/. - D - ino Yvette VIERNE estos la reprezentantino de nia federacio en Grenoblo.

4°/. - Voĉ dono por U.F.E ( " Franca Esperantisto " n° 302 ) :
Rajtis voĉdoni : 40 voĉdonis : 21

- agadraporto )
- financa raporto ) UNUANIME APROBITAJ PER 21 VOĈOJ
- buĝeto 76/77 )

- konsilio : 3 voĉdoniloj estis senvalidaj. La indikitaj nombroj post la nomoj indikas la ricevitajn aprobojn :

AMOUROUX ( 18 ), BERNARD ( 18 ), CASH ( 15 ), DEGRELLE ( 7 ), DELCOURT ( 13 ), DESPINEY ( 16 ), GONIN Hervé ( 17 ), GONIN Raymond ( 15 ), LUEZ ( 11 ), texier( 14 ), VIERNE ( 18 ).

## SUKCESA FEDERACIA KONGRESO EN NIMES

5°/. - La membroj de la federacio Langvedoko - Rusiljono kongresintaj en Nîmes la 7 - an kaj 8 - an de majo 1977 :

- gratulas la gvidantojn de U.F.E kaj la komisionojn pri verbado kaj por la rilatoj ĉe UNESKO, kaj subtenas ilian agadon,

- konstatas, ke iom pliboniĝis la nivelo kaj la prezento de " Franca Esperantisto ",

- opinias, ke de la nacia ligilo multo dependas por varbi kaj konservi la aktivajn membrojn kaj ke nur kiam ĝi estos multe pli inda je prezento kaj enhavo ĝi povos pretendi havi multe pli da abonantoj kaj da sukceso por kolekti pagitajn reklamojn,

- konfirmas, ke por plifirmigi la revuon la plej efika dekomenca monrimedo estas kolekti monon pere de " fonduso revuo " kiam la nuna " fonduso materialo " estos fermita,

- se plibonigo de la nacia revuo ne eblas, ni petas la estraron de UFE jam pripensigi la jenan demandon dum la ĝenerala laborkunsido en Grenoblo :

> ĉu samkiel jam faris kelkaj naciaj Esperanto - asocioj ne estus solvo, ke la francaj esperantistoj ricevu la oficialan organon de UEA, " esperanto ", kaj ke, kiam necese, estu enŝovita " letero de UFE " por la internaj aferoj konsernantaj nur la francajn esperantistojn? Kiu estos la monresono por la financoj de UFE kaj de la membroj?

La kongresintaj membroj de nia federacio krome konstatas, ke ŝajne la nova kategorio " Amis de l'esperanto " ne multe sukcesis, sed la eksperimenton ni devas daŭrigi alportante la du jenajn modifojn :

- la vendoprezo estas tro alta kaj ŝajnas, ke 10,00 Frs sufiĉus,

- UFE sendu al la federaciaj kasistoj kvanteton da membrokartoj kaj la federaciaj kasistoj mem ilin sendu al la grupoj por disvendo.

La celo de tiu kategorio estas, kompreneble, kolekti monon, sed ankaŭ pliampleksigi la nombron de la membroj de U.F.E.

La neesperantistojn ni povos atingi nur se ni povos ion tuj doni ( la karton ) kaj se la petita sumo estos malalta.

---

## FEDERACIO GARD

Post kelkaj pluvaj tagoj, la nuboj disiĝis kaj fine la suno brilis en tiu dimanĉo 24 - a de aprilo.

Je la deka, niaj geamikoj kuniĝas sur la placeto en la Roque - sur - Céze. Ili venis el Nîmes, Avignon, Privas, Alès.

Pentrinda estas la vilaĝeto konstruita sur la flanko de monteto. La malnovaj domoj, la deklivaj stratetoj pavimitaj per krutaj plataj ŝtonoj iom memorigas. Les Baux - de - Provence aŭ éze. De tie oni malkovras la belan panoramon de la Céza valo.

La kaskadoj de Sautadet - je duonkilometro de la vilaĝo estas kurioza erozio de la kalka roko fare de la rivero, kiu faris konsiderindan nombron da sulkoj kaj " marmitoj ".



## Nia Jara ekskurso

Ni trovis tie taŭgan lokon por pikniki kaj je le 14 a ni veturis ĝis la bela ŝtatbiena arbaro Valbonne meze de kiu la samnoma Kartuzio - kiun ni vizitis - estas vera ripozloko por la tie kuracataj malsanuloj.

Sume, tre agrabla tago en plej samideana etoso.

René RAYNAUD

---

Vi ĵus diris al mi : " La kunveno komencos je la 9 - a " !
Ne, ne, kara amiko, vi eraras !
" La kunveno komenciĝos je la naŭa " aŭ ; se vi preferas
" Ni komencos la kunvenon je la 9 - a "

Influas vin via patrina lingvo.
KOMENCI estas transitiva verbo, t.e nepre akceptas " objektan komplementon "
Per konkretaj ekzemploj, alkutimiĝu diri :
ekz : mi komencas la konstruon, mi komencas la laboron
la konstruo komenciĝas, la laboro komenciĝas

Same pri FINI : mi finas la konstruon
la konstruo finiĝas.
SED, inverse CESI, PASI, HALTI, estas netransitivaj
La kunveno ĉesas ; tempo pasas rapide, la aŭto haltas
Mi ĉesigas la kunvenon, mi pasigas agrablan tempon, mi haltigas la aŭton.

Rimarko : En " li batas sian hundon " BATI estas transitiva
En " lia koro batas " BATI estas netransitiva,
Sed la sencoj de la verbo bati en tiuj du ekzemploj estas tute diferencaj.

LEO LENTAIGNE

---


# Lingva angulo :

"Perfektigi

estas devo"



# Financa Raporto okaze de la Kongreso



*en NIMES la 8an de Majo 77*

Nia tuta havaĵo hodiaŭ konsistas el :

| | |
|---|---|
| En la Poŝtakonto ......................... | 1288,97 Frs |
| En la Kaseto ......................... | 143,10 Frs |
| En la ŝparkaso, inkluzive de la rentumo de La pasinta jaro ......................... | 1043,00 Frs |
| Tio estas, entute ......................... | 2475,07 Frs |

En tiu sumo estas 287,80 kiuj venas de la vendo de la zamenhofaj poŝtakartoj de nia federacio.

Cent frankoj venas de la vendo de la libro " La Nuda Vero " de nia Amiko D - ro SALAN.

Okaze de nia lasta kongreso en béziers, la kvarkoloraj afiŝetoj de nia amiko RAYNAUD donis al ni profiton el 263,00.

Hodiaŭ, tiu profito devus konsisti el 507,00 sed intertempe, oni eldonis novajn afiŝetojn kiuj kostis 651,11. Do tiu konto saldiĝas per deficito el 144,15 sed restas grava stoko kiun ni devos vendi, kaj tiam, tiu konto refariĝos profitdona.

Maurice DELIGNE

## ESPERANTO FEDERACIO LANGVEDOKO- RUSILJONO

Listo de la E - grupoj kiuj ekzistas sur la teriterio de nia federacio kun adreso de la grupvidantoj. Entute ekzistas sep grupoj. Nome :

ALES : Sro rené RAYNAUD
4, rue chotard
30100 ALES

BEZIERS : S- ino AUTHIER
9, rue Georges Picot
34500 BEZIERS

MONTPELLIER : D - ino Y. VIERNE
5, rue Docteur Roux
34000 MONTPELLIER

NARBONNE : S- ro M. DELIGNE
3 ( C ), rue P. Ramadier
11100 NARBONNE

PERPIGNAN : ekzistas du grupoj :

- Esp; kulturcentro :

S - ro René LLECH - WALTER
72, av. G. DE Gaulle
66000 PERPIGNAN

- U.S.C.M. - ESPERANTO :

Jean AMOUROUX
1, rue de Sorède
66000 PERPIGNAN

NIMES : S - ino R. VOLPELIERE
8, rue Rouget - de - Lisle
30000 NIMES

En Narbono, la jaro de tro malbone komenciĝis. Ĉiuĵaude, tri kursoj funkcias. Unu por la komencantoj, gvidata de S-ro COQUIN kiu, lastan someron restadis tri samajnojn en Grésillon kie li sukcese trapasis la duagradan ekzamenon; kvin gelernantoj partoprenas en tiu kurso.


Unu pliboniga kurso, gvidata de mi pere de la libro "Por la Praktikantoj" kun tri gelernantoj.

Poste okazas babilkunveno en kiu partoprenas ses aŭ ok personoj. Dum tiu babilado estas malpermesite krokodili, krom por peti klarigojn aŭ tradukojn.

Krome, tri gelernantoj kiuj loĝas en vilaĝoj, malproksime de Narbono, studas hejme. Mi vizitos ilin de tempo al tempo por, se necese, remeti ilin sur la bonan vojon.

En nia grupo, S-ino DAVID kiu persone varbis kvin novajn lernantojn meritas apartajn gratulojn.

Maurice DELIGNE.



*Maria & Geoffrey King*

*are delighted to announce the birth of their first child*

*anoncas kun ĝojo kaj kortuŝiĝo la naskiĝon de ilia unua infano*

*annunciano con gioia e commozione la nascita della loro prima bambina*

**Leonora - Dina**

*Chase Farm Hospital (Enfield)*
*24.5.77 * 16 h.15 * 3,400 kg*

*14, Elmdale Road*
*London N 13 - 4 UL - (GB)*

# VIVO DE LA GRUPOJ

NIMES — 1976-77 estis bona jaro por la studado de Esperanto : la kursoj komenciĝis kaj finiĝis kun 6 gelernantoj de la unua grado kaj 3 de dua grado. Sed ĉiuj povos trapasi la ekzamenojn nur en oktobro, ĉar la kursoj komenciĝis en decembro.

La gelernantoj multe ŝatis la viziton de la du hungarinoj. Post tiu de la japanino tio permesis novan interparoladon : efikan elmontron pri la kvalitoj de nia lingvo.

Ni do aplaŭdas la intencon de UFE organizi vojaĝojn de fremlandanoj en Francio kaj oni esperas ke malgraŭ la malfacilaĵoj kiu en havas, tiuj projektoj povos baldaŭ realiĝi.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES
Dépot Légal : 2me Trimestre 1977
Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes